
# auanco

1/02

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



**Oficiala Organo de Kuba Esperanto-Asocio**
13a jaro, n-ro 3 (1/2002)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:
Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)53 9102
kaj 40 4484
Fakso: 33 8729
Retadreso:
kubesp@ip.etecsa.cu

Ĉefredaktoro:
ALBERTO GARCÍA FUMERO

Revizias kaj kontrolas:
MARITZA GUTIERREZ GONZALEZ

Enpaĝigo:
ALBERTO GARCÍA FUMERO
ALBERTO FDEZ-CALIENES BARRIOS
ROBERTO MOLINA GÁLVEZ

Prezo: (enlande) CUP 1.00
(eksterlande), EUR 2.00
aŭ 2 irk., pagendaj al la
UEA-konto: keax-u

*Ĉiuj rajtoj rezervitaj*
*Reproduktado permesata (bv. indiki la fonton kaj sendi du ekzemplerojn al la Redakcio).*
*Interŝanĝo dezirata.*

***La kovrilo:** Dum la 3a Nacia Kultura Festivalo, Manuel Rodríguez lotumas premiojn. Inter la partoprenintoj aktivis infanoj el Urbo Havano kaj Holguín (lernantoj de Raymond Fonseca). Foto: Alejandro García Acosta.*

## estimataj:

*Danke al la sindediĉa laboro de la redakta teamo, nia* Avanco *rekaptas aperritmon kaj akiras novan viglon. Jam eblas rimarki la ŝanĝojn. Nia bulteno fariĝas pli facile legebla, kaj atentoaltira.*

*Ĉi-numere vi trovos ne nur la kutiman informon pri la Nacia Komitatkunsido, sed ankaŭ, en kromaj paĝoj, artikolojn pri la 4a Nacia Kongreso kaj la partopreno de KEA en la Internacia Librofoiro Havano 2002, kiu estis vere unika okazintaĵo por Esperanto en Kubo. Kvankam oni kutimas diri, ke daŭrigaj partoj neniam estas bonaj, tiukaze la unua estis la plej malbona. Tamen, surpriza sekvo de la Librofoiro estis invito al KEA flanke de la Kuba Libroĉambro partopreni postfoiron (la dua parto de la afero) en Dominika Respubliko...*

*Via redaktoro,*

Ĉu vi jam pagis vian kotizon?
Via membreco
estas grava por la asocio.
Pensu pri tio!

## enhavo

***Nova jarmilo, nova defio***
MARITZA GUTIÉRREZ GONZALEZ — 3

***Estrara Raporto pri la agado dum 2001***
NACIA ESTRARO — 4

***Ni daŭrigas antaŭen***
JUAN RAMÓN RODRIGUEZ GÓMEZ — 18

***Alkongrese: ĉu nur lingve?***
MARITZA GUTIERREZ GONZALEZ — 20

***Sed dissaltis la obstinaj baroj***
ALBERTO GARCIA FUMERO — 22

# Nova jarmilo, nova defio

Ekde la estiĝo mem de Kuba Esperanto-Asocio en 1979, fariĝis tradicia la jara plenkunsido de la nacia komitato de la asocio, supera instanco kiu gvidas kaj fiksas la strategian linion kaj laborplanon de ĉiu jaro. Ni daŭre sekvas tiun tradicion tiel, ke KEA daŭre sukcesas antaŭvidi planojn kaj agadojn por ke Esperanto nialande havu sian estontecon kiel lingvo kaj movado.

Ankaŭ ĉi-foje la komitato de nia asocio pritraktis kaj kritike analizis la laboron faritan dum la pasinta jaro kaj la ĉefajn taskojn de la venonta periodo. Tion oni faras surbaze de raporto kompilita de la naciaj estraranoj de KEA pere de la raportoj senditaj de la koncernaj filioj. La raporto de la nuna jaro havas duoblan karakteron, ĉar ĝi inkluzivas la plenumitan taskaron de la nacia estraro dum la jaro 2001 kaj samtempe fermas etapon trijaran. Temis pri mandato karakterizita per gravaj ŝanĝoj en labormetodoj kaj procedoj. Ili tuŝis esence la administran kaj financan sferojn, ĉar certe tri jaroj pasas tro rapide por fari pli profundajn ŝanĝojn en la agado de asocio jam matura kaj prestiĝa ne nur enlande, sed ankaŭ eksterlande. Tamen, ĝi estis grava periodo por plifortiĝo de nia institucio kaj kiel mezurilo de nia sanstato diversflanke.

Multaj obstakloj leviĝis antaŭ ni, ekonomiaj, materiaj, laboraj, eĉ interhomaj, kiujn ni, kiel esperantistoj, klopodis superi por plu teni firman la dorsan spinon de nia movado. Ankoraŭ la tempo devos diri, ĉu ni sukcesis plene aŭ nur parte, sed ankaŭ estas tasko de la komitatanoj daŭre cerbumi kaj serioze konscii pri la devo antaŭenigi nian asocion al unueca komunumo kies supera celo estas disvastigi kaj instrui la lingvon en nia lando kreante solidarajn sentojn kaj fratecan pensmanieron inter nia membraro.

Dum la jaro 2001 nia movado festis sian 22an jariĝon kun optimismo tra la tuta lando. Okazis seminarioj pri instruado kaj informado, kultura festivalo, (unue planita por urbo Camagüey, kaj lastmomente dece anstataŭita de Havano), renkontiĝo nacia en la orienta provinco Guantánamo, krom pluraj lokaj eventoj kaj regulaj aranĝoj kulturaj aŭ klerigaj en diversaj filioj. La jaro 2002 staras antaŭ ni defie kaj plena je taskoj, kiuj postulos de ni forton kaj tempon.

Do, estante konsciaj pri nia respondeco, ni estu kiel eble plej saĝaj kaj kunlaboremaj por ke la estonteco estu ĉiam pli bona kaj nia poresperanta laboro ĉiam pli fariĝu frukto de nia kunagado kaj esperantismo.

Bondezirojn kaj esperon al la kuba movado!

Maritza Gutiérrez González



# Estrara Raporto
# pri la agado dum la jaro 2001

## 1. INFORMADO

La jaro 2001 estis markita de la 22a datreveno de nia asocia ekzisto kaj tiel estiĝis diversaj planoj kiuj fruktodonis pere de stabila informa laboro tra la tuta lando, ĉefe dum la unua semestro. Niaj rilatoj kun la radiaj amaskomunikiloj daŭre montriĝis solidaj en la plenumo de nia informa laboro.

***1.1. Regula informado pri E, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciu pri nia agado.*** La regula informado estis ja kontentiga pro la menciitaj kialoj. Oni entreprenis diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj: radio, ĵurnaloj kaj televido kun la konstanta valora helpo de Alejandro García, kio alportis kontentigajn rezultojn. Regula informado efektiviĝis per tutlandaj kaj lokaj radiostacioj: *Progreso*, *Rebelde*, *Reloj*, *Radio Havano Kubo* (krom la dimanĉaj programoj, oni faris kaj diskonigis kelkajn intervjuojn kaj specialajn programojn, ekzemple *Indagaciones*), *CMHW* (Villa Clara), *Sancti Spíritus*, *Surco* (Ciego de Ávila), *Cadena Agramonte* (Camagüey), *Bayamo* (Granma), kaj en Santiago de Cuba, *Mambí*, *Siboney*, *Grito de Baire*, *Protesta de Baraguá* kaj *CMKC*. Krome oni parolis unuafoje pri Esperanto en nacia televidkanalo kaj plurfoje en regionaj kanaloj. Samtempe, la informa agado per retmesaĝoj estis aparte vigla dum la jaro flanke de la koncerna estrarano, kiu dissendis al la plej gravaj E-informcentroj ĉiujn plej gravajn noticojn pri la agado de la Asocio dum la jaro; dank' al tiu agado, nia asocia retadreso estas enskribita en la ĉefaj E-listoj: *landa-agado*, *akademia-diskuto*, *bja-listo*, ktp., kie ni aktive partoprenas. Krome, estis tre grava la grafika propagando pri kursoj kaj kelkaj ekspozicioj.

***1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E en sia medio por varbi kaj novajn membrojn kaj amikojn de E.*** Grava parto de tiu ĉi agado estis farita en diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Tiurilate, ni devas pli kaj pli insisti, tiel ke niaj homoj ricevu jen en la kulturkleriga aranĝoj, jen en la klasoĉambroj, regulan informadon pri tiklaj temoj rilate la lingvon kaj evoluon de la nacia kaj internacia E-komunumo.

***1.3. Garantii la eldonon de* Avanco *(4-foje jare),* La Noktuo *(4-foje),* Universo *(6-foje) k. a. bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.*** Rilate la asociajn organojn, la realo estis preskaŭ kaosa. Grava afero estas ke, post komenca ĝisdatigo, *Avanco* malfruiĝis pro manko de informoj kaj kunlaborantoj (malmulte da kunlaboraĵoj venis el provincoj), kaj krom tio plimulto de la artikoloj devis esti verkitaj de la redaktoro mem, ĉar nia oficiala organo iom post iom turniĝis en laboron de unusola homo. Pro tio, dum la jaro nur aperis du el ili (la septembra eldono forlasis la presejon en januaro 2002, kaj ankoraŭ, fine de februaro, ankoraŭ pendantis la finpretigo de la kvara). Rilate al *La Noktuo*, aperis tri numeroj (la kvara eldono jus aperis). Dum 2001, *Universo* refoje restis silenta, kaj same okazis pri *Saĝa Sago* (kvankam oni laboris preparante unu nume-

ron) kaj *KEATUR*. Pro la graveco de la menciitaj informiloj, ilia nepublikigo signifis perdi eblecojn diskonigi la asocian agadon kaj, samtempe, ne sufiĉe nutri la movadanojn per konindaj aspektoj de la landa kaj internacia E-movadoj. Tamen, *Jajabo* (Sancti Spíritus), *La Giraldilla Esperantista* (Urbo Havano) kaj *La Famo* (Guantánamo), aperis kelkfoje.

***1.4. Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro***. Tradicie ni havas kiel labormaniero stimuli la esperantistojn kontribui al apero de KEA en la internacia E-gazetaro, sed dum 2001 tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla, malgraŭ laboro de la koncerna estrarano. Aliflanke, por la venonta KEA-Kongreso oni sukcesis aperigi reklamon en la novembra numero de la revuo *Esperanto* kaj ankaŭ per la retligilo, celante allogi interesitojn. Tamen potencialo estas pli alta kaj ni devas konstante alvoki aliajn talentajn esperantistojn pli aktivi en tiu agadkampo.

***1.5. Reaperigi la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn***. Rilate la hejmpaĝon de KEA en Interreto, dum la jaro oni daŭre klopodis ĝin restarigi, sed vane. Nuntempe ni atendas pli firman retaliron por ĝia reverkado kaj instalado ĉe iu el la senpagaj serviloj en Interreto. La malapero de nia paĝaro estas bedaŭrindaĵo, ĉar multe ĝi kontribuis al informado pri la ekzisto de KEA nacie kaj internacie. Tamen,danke al la laboro de Norberto Díaz en Sancti Spíritus ekzistas paĝo pri KEA kaj pri Sancti Spíritus.

## 2. *NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ*

***2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 22a datreveno de KEA***. Laŭ konkretaj kondiĉoj la filioj organizis diversajn aranĝojn kaj diskonigis ilin. La ĉefa aranĝo estis organizita en Havano en kunordigo kun la provinca filio. La okazo estis bone uzita ekde informa vidpunkto.

***2.2. Okazigi Nacian Kulturan Festivalon en Camagüey.*** Malgraŭ la fakto ke Camagüey organizis kaj precizigis preskaŭ ĉiujn detalojn en rilato kun la Festivalo, pro eksterasociaj kialoj aperis malfacilaĵo por garantii la revenbiletojn de la partoprenontoj, kaj la filioj mem ankaŭ ne povintus tion solvi ekde siaj respektivaj teritorioj, kio reale estas tikla afero kaj por la esperantistoj kaj por la Asocio. Post longa analizo oni venis al la konkludo, ke la plej taŭga solvo estus ŝanĝi la sidejon de la Festivalo al Urbo Havano, kiu bonŝance kaj akurate organizis kaj efektivigis ĝin, en la kampadejo Celimarina, dum la planita dato (inter la 29a de novembro kaj la 2a de decembro). Laŭ la enhavo, okazigo kaj partopreno (64 personoj), oni taksas ĝin tre sukcesa.

***2.3. Okazigi Nacian Seminarion pri Informado en Sancti Spíritus.*** Dum du sinsekvaj jaroj (1999 kaj 2000), oni intencis okazigi ĝin, sed kelkaj lokaj malfacilajoj ne ebligis tion. Tamen, je la tria fojo, la afero iris antaŭen kaj la Seminario demonstris sian gravecon cele al informado kaj propagando favora al E enlande, laŭ la opinioj de la partoprenintoj (15 personoj el 7 provincoj). Dum tri tagoj (7a-9a de marto), oni laboris kvazaŭ metieje kaj ĉiuj reagis favore al ties ĉiujara okazigo.

***2.4. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Guantánamo.*** La tutlanda renkontiĝo okazis tre sukcese. La partoprenintoj ne nur festis sed ankaŭ profitis la okazon por analizi temojn rilatajn al edukado kaj kulturo. La organizintoj serioze laboris por garantii

plenan sukceson de evento kiu sendube imitindas. Tiaj renkontiĝoj devas esti daŭraj, pro tio ke ili stimulas la lokan movadon kaj estas fonto de inspiro por la esperantistaro.

*2.5. Okazigi Nacian Seminarion por Instruistoj.* Meze de la jaro, okazis la 10a Nacia Seminario por Instru(ant/ist)oj kun la jam tradicia enhavo, vere altvalora ekde faka vidpunkto. Tamen, partoprenis nur naŭ homoj (6 el Urbo Havano, 2 el Santiago kaj 1 el Sancti Spíritus), kio vere estas bedaŭrindaĵo. Analizendas la fakto, ke iom post iom malaltiĝas la partopreno en tiu ĉi grava seminario por la asocia agado, kio devigas nin pli funde pripensi ĉion en rilato kun estonta strategio. Ne nur la NE, sed ankaŭ la filioj devas garantii la plenumon de tiu ĉi tasko. ILEI akceptas la kuban proponon pri internacia seminario por instruistoj en Kubo.

## 3. *DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ*

Nia ĝenerala plano ĉi-rilate estis grandparte plenumita, foje pli bone, foje ne kiel atendite, kaj en aliaj okazoj tre bone. Temas pri konstanta asocia bezono kreskigi kaj disvastigi la movadon, malgraŭ tio, ke ne ĉiam ni sukcesu en difinita periodo, kio neniel devas senentuziasmigi nin, sed male instigi nin al konstanta semado. Tamen, malkontentigas nin la fakto ke, dum la periodo, pro diversaj kialoj ne eblis al naciaj estraranoj viziti la filiojn tiel ofte kiel tradicie. Tio meritas revigliĝon, ĉar pere de tiuj vizitoj la estraranoj havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan surloke.

*3.1. Labori por revigligi la movadon en la teritorioj kun jura personeco:*

**Insulo de la Junularo**: Dank' al la laboro farita tie en 1999 kaj 2000, oni daŭrigis la agadon surloke dum la jaro 2001, ne ĉiam tiel sukcese kiel dezirite, sed kontentige. Ili stabiligis la aktivadon je diversaj branĉoj (kulturo, aranĝoj, informado, instruado, publikaj rilatoj, ktp.) kun la membraro (11 kaj 8 en ambaŭ semestroj).

**Havano**: Malgraŭ la fakto, ke oni provis plurfoje aktivigi la agadon en tiu provinco, rezultoj ne videblas. Vere ni nenion povas informi pri nuntempa agado surloke, ĉar evidente mankas vigla kaj respondeca aktivulo. Esperantistoj el Quivicán parolas pri loka grupo ema aktivi, sed nenio konkrete okazas. El Santa Cruz del Norte, nur hazardajn komentojn ni ricevas pri vivanteco de loka infangrupo. Aldonendas, ke la Estraro ne estis sufiĉe postulema kaj agema ĉi-kaze.

**Villa Clara**: La reorganizo de la laboro en tiu ĉi filio fine de la jaro 2000, la elekto de nova Estraro, kaj la preparkondiĉoj kaj sukcesa okazigo de la pasinta Komitatkunsido tie, montris al ni la eblecon repreni la tradician vojon antaŭe sekvitan en Villa Clara, sed la rezulto estis preskaŭ nula. Plurfoje oni provis sensukcese kontakti la Prezidanton aŭ la Ĝeneralan Sekretarion. Ni ankaŭ sendis ĉiujn protokolojn de niaj kunsidoj rekte al Daniel Alemán, sed reago neniam venis. Laŭ lasta informo, la filio nun ne havas prezidanton, do oni devas reorganizi la laborteamon surloke.

**Holguin**: La laboro en tiu orienta filio pli malpli samas al tiu de 1999 kaj 2000, ĉar ili aktivas diverskampe, sed preskaŭ nenion informas. En julio ni ricevis 7 kungrampitajn protokolojn (januaro-julio), en kiuj oni raportas pri aranĝoj. En tiu monato, ili sendis CUP 105.00 (kaj plian kvanton ĝis nun

ne precizigitan), sed neniam sendis la koncernajn kotizkvitancojn nek dokumenton pri la membro-kontrolo. Do, ni malhavas konkretan informon pri la membraro. Tamen, menciendas la laboro surloke farita de Raymond Fonseca rilate al infanoj. Tiu ĉi lasta aktive partoprenis en la Tutlanda Seminario pri Informado kaj en la Festivalo.

### *3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas, Granma kaj Cienfuegos.*

**Matanzas**: Ni ne sukcesis disvastigi la movadon de Pedro Betancourt al aliaj teritorioj. Tamen, en tiu municipo dum la unua trimestro de la jaro oni plialtigis la membronombron en rilato kun la jaro 2000 (de 22 al 25) kaj ĝustatempe plenumis ĉiujn erojn por la tutlanda konkuro inter filioj, sed poste neniu plia informo venis al ni. Raúl Rodríguez plurfoje vizitis la Sidejon de KEA kaj oni profitis la okazojn paroli pri la situacio, sed oni ne vidas reaktiviĝon de la laboro.

**Granma**: Imitindas la laboro farita tie, kie la movado stabiliĝis kaj kreskis dum la periodo, dank' al serioza organizo, aktiva agado, forta propagando, intensaj publikaj rilatoj, ktp., el kio fontis kresko de la membraro. Dum la jaro ni estis bone informitaj pri tiu filio, ĉar ĉiuj informoj alvenis ĝustatempe kun ĉiuj detaloj, krom dekoj da telefonaj kontaktoj flanke de ili por informi aŭ peti informojn. Do, nuntempe la poresperanta agado avancas denove, kaj nun oni laboras por plikreskigi kaj firmigi la filian agadon.

**Cienfuegos**: Neniu kontakto sukcesis dum la jaro 2001 kun la loka prezidanto. Oni sendis ĉiujn protokolojn de niaj kunsidoj, vokis lin telefone pere de najbaroj kaj aliaj esperantistoj, sendis leterojn, sed reago neniam venis. Meze de decembro la prezidanto persone informis al Marta, ke li vere ne havas tempon pro la fakto, ke li laboras for de la urbo. Evidentas, ke oni devas reorganizi la teamon.

### *3.3. Labori por reaktivigi la agadon en Pinar del Río, Las Tunas kaj Ciego de Ávila.*

**Pinar del Río**: Delonge la Estraro laboras por naskigi novan grupon en la plej okcidenta provinco, sen konkretaj rezultoj. La baptopatroj kelkfoje provis trovi vojojn tiucele. Fine de la jaro '99, oni trovis kelkajn interesitojn, klopodis rekontakti ilin plurfoje dum la jaroj 2000 kaj 2001, sed kunordigo mankis kaj tio ne sukcesis ĝis nun.

**Las Tunas**: La agado tute falis. Laŭ telefona kontakto, Osmundo Marrero, nia aktivulo tie, pretas labori, sed nek informojn nek kotizojn ni ricevis dum la jaro, malgraŭ la fakto ke ĉiumonate la NE sendis al li protokolojn kaj aliajn labordokumentojn.

**Ciego de Ávila**: Nur Pedro Pablo Lamas laboras tie. Li multege agas sur la kampo de informado. (16 informoj per radio kaj plia per la loka televido), sed nur kun la celo informi pri la Internacia Lingvo laŭ diversaj vidpunktoj. Li mem detale raportis pri tio. Fine de la jaro, li transdonis al KEA kelkajn centojn da libroj, gazetojn kaj aliajn materialojn kaj, plej grave, ĉirkaŭ 300 leterojn subskribitajn de Antonio Alemán Ruiz (de la periodo 1950-68), kiuj sendube estas gravegaj dokumentoj pri nia historio.

## *4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO*

Dum la jaro, la situacio rilate al organizado kaj interna administrado montriĝis ĝenerale sufiĉe stabila. Tamen, ni regule devas

*Tabelo 1: Membrokontrolo 2001*

| Filio | 1/01 | 2/01 |
|---|---|---|
| Pinar del Río (PRI) | - | - |
| La Habana (LHA) | - | - |
| Ciudad de La Habana (CHA) | 167 | 204 |
| Isla de la Juventud (ISJ) | 11 | 8 |
| Matanzas (MTZ) | 25 | - |
| Cienfuegos (CFG) | - | - |
| Villa Clara (VCL) | 20 | 6 |
| Sancti Spíritus (SSP) | 10 | 6 |
| Ciego de Ávila (CAV) | 1 | 1 |
| Camagüey (CMG) | 112 | 112 |
| Las Tunas (LTU) | - | - |
| Holguín (HLG) | [A] | [A] |
| Granma (GRM) | 42 | 56 |
| Santiago de Cuba (SCU) | 106 | 74 |
| Guantánamo (GTM) | 19 | [B] |
| PKK-NE [C] | 15 | 9 |
| **Totalo** | **528** | **476** |

*Tabelo 2: Perkoresponda Kurso (NE)*

| Teritorio | 1/01 | 1/01 |
|---|---|---|
| Pinar del Río | 2 | 2 |
| Havano | 4 | - |
| Insulo de la Junularo | 1 | 1 |
| Matanzas | 2 | 2 |
| Cienfuegos | 3 | 1 |
| Villa Clara | 1 | 1 |
| Las Tunas | 1 | 1 |
| Santiago de Cuba | 1 | 1 |
| Totalo | 15 | 9 |

*Rimarkoj*

A. Fine de la jaro, telefone, Isnel informis pri 42 kaj 69 membroj en la du semestroj, respektive, sed nenian precizigon ni havas, nek dokumenton pri la membro-kontrolo, nek kotizkvitancojn, nur CUP 105.50 en julio kaj plian ne precizigitan kvanton en decembro.

B. En januaro 2002 ili sendis CUP 59.90, sed ni ne scias, pri kio temas.

C. En 2001, la NE atentis la jenajn kvantojn da PKK-lernantoj *(vd. tabelon 2)*.

insisti pri la bezono ke la filioj plibonigu siajn respektivajn kontrolojn kaj pli akurate sendu la dokumentojn pri la membro-kontrolo, kotizon, kotizkvitancojn, protokolojn kaj aliajn informojn. Ni devas mencii, ke la plej akurataj filioj tiusence dum la periodo estis Santiago de Cuba, Granma, Sancti Spíritus kaj Urbo Havano, dum la ceteraj tion faris iom lante kaj ofte parte aŭ preskaŭ faris nenion, kio ne kontribuis al bona tutlanda organizo en tiu laborkampo. Bezonatas ankoraŭ plibonigi tiun ĉi agadon kaj finaranĝi la ĝeneralan uzon de la formularo por kontrolo de la membraro, la koncernajn kotizkvitancojn kaj ties kongruon kun la membro-kontroldokumenton, tiel ke oni povu pli travideble havigi al si la plej fidindan informon pri niaj membroj dum la diversaj periodoj de la jaro.

**4.1. *Membrokontrolo kaj kotizo*:** Kelkaj filioj dum la jaro ne sendis ĝustatempe la membro-kontroldokumentojn kaj la koncernajn kotizojn kaj kotizkvitancojn, kaj en kelkaj kazoj tiuj malfruaj informoj alvenis al la NE kun malkongruoj aŭ manko de bezonataj sciigoj, kio krome malhelpis. Tamen, la tutlanda konkurado multe stimulis la filiojn, sed ne ĉie. La plej bonaj filioj en tiu ĉi fako estis Santiago de Cuba, Granma kaj Sancti Spíritus. Ne eblas atendi ĝis la lasta momento por koni la realon, ĉar tio estas malavantaĝo por nia daŭra laboro. Ĉiuj devas gajni akuratecon tiusence.

**4.2. *Atento kaj vizitoj al filioj:*** La atento al filioj estis plenumata pere de diversaj rimedoj, nome kontrolvizitoj, fakaj kaj privataj vizitoj, leteroj, protokoloj kaj telefonado. Ni vojaĝis trifoje al Camagüey, dufoje al Granma kaj Santiago kaj po unu al Villa Clara kaj Sancti Spíritus, sed preskaŭ ili ĉiuj estis en rektaj rilatoj kun eventoj (Komitatkunsido, Festivalo, Seminario pri

Informado...). Pro diversaj kialoj, ne estis veraj kontrolvizitoj, escepte de unu el ili al Granma kaj Santiago. Krome, la estrarano pri financo dufoje kontrolis tiun fakon al la PF Urbo Havano. Aliaj personaj kontaktoj okazis kun reprezentantoj de Guantánamo, Holguín, Camagüey, Ciego de Ávila, Sancti Spíritus, Matanzas (Pedro Betancourt), Havano (Quivicán), la ĉefurbo kaj Insulo de la Junularo; kaj telefonaj kontaktoj kun ĉiuj (eĉ Las Tunas, Villa Clara kaj Cienfuegos). Aparte menciindas partopreno de la prezidantino en kunsido kun la orientaj filioj en Santiago de Cuba. Dum la jaro ne glate funkciis la atento, kiun devintus doni baptopatroj al diversaj filioj. Tio estas analizinda temo niaflanka ĉar tiamaniere naciaj estraranoj povas esti pli proksimaj al la agado kaj bezonoj de siaj baptofiloj.

***4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj***. Ni kontrolis ĉiujn membrojn -subtenantojn tra la lando kaj sendis al ili la unuan numeron de *Avanco*. Tamen, ni konsideras ke ĉi tiu agado ne estis sufiĉa. Mankis daŭraj kontaktoj je nia flanko kaj tio vere malhelpas la agadon de la Asocio, ĉar ju pli ni atentos ilin des pli da ili ni havos. Ankaŭ en la filioj oni devas plu stimuli kaj atenti la lokajn membrojn-subtenantojn.

***4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon***. Ĉi-kaze ekde la komenco de la jaro, ni pro diversaj kialoj kontaktis ilin telefone, persone aŭ letere; kaj, samtempe, la NE sendis ĉiam al ili la monatajn protokolojn. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko de ĉiu estrarano.

## 5. PUBLIKAJ RILATOJ

Niaj publikaj rilatoj ĝenerale stabilis dum la tuta jaro, sed restis sub la reala potencialo plenumenda. Kiel tradicie ni faris plurajn kontaktojn okaze de niaj aranĝoj tutlandaj kaj regionaj, kio devas resti kiel principo kaj tiuceie oni devas pli regule tion fari kaj poste flegi la jam faritan kontakton.

***5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiuj niveloj; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiuj instancoj laŭeble***. La rilatoj kun politikaj, registaraj kaj aliaj instancoj je ĉiu nivelo estis konstante flegataj nacie kaj loke: inter aliaj, la ministerioj pri Kulturo kaj Justico, kvankam bezonatas pli da konstanta kunlaboro. Kun la rilatorgano regule okazis kontaktoj, sed ni devas labori por ke estonte tia rilato fariĝu ne nur informa de ni al ili, sed iamaniere pli kunlabora.

***5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo***. Niaj ligoj kun la kultura vivo de la teritorioj daŭris kaj plifortiĝis kun kulturdomoj, bibliotekoj, kelkaj komunumoj kaj aliaj kulturaj instancoj, kvankam tio ankoraŭ, plibonigendas survoje al pli altaj atingoj. Tia agado bezonas pliajn konkretajn projektojn por vera efektiviĝo.

***5.3. Iniciati konkretan kunlaboron kun aliaj asocioj kulturklerigaj: UNESCO, Kuba Asocio de UN, Kariba Asocio kaj la Kuba Movado por la Paco***. Ni daŭrigis niajn fortajn kontaktojn kun kelkaj kulturklerigaj asocioj, ĉefe Eldonejo José Martí (nia rilatorgano), Kuba Asocio de UN, ICAP kaj Asocio de Lingvistoj. Aliajn kontaktojn oni faris, interalie kun la Kariba Asocio kaj la Kuba Movado por la Paco, sed ĝis nun tiuj ne estis fruktodonaj. En la kazo de ICAP, oni havis kelkajn kontaktojn rilate al la temo de sendaĵoj por KEA flanke de s-ro Eddy Raats, el Belgio, kaj tio efike funkciis. Kvan-

kam ni havas skizon jam proponitan al UNESCO, dum la jaro tiu ĉi temo ne sukcesis plu avanci, kio devigas nin labori tiudirekte.

## 6. *FINANCO*

***6.1. Flegi la internan administradon de la sidejoj de KEA:*** La administraj taskoj plenumitaj koncentriĝis en la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la Nacia Sidejo de KEA, kio eblígis diversajn servojn al interesitoj, vizitantoj kaj kubaj kaj eksterlandaj esperantistoj. Oni devis daŭre flegi la financan flankon de la administra laboro, atenti la laboristojn kaj aliajn taskojn de la interna funkciado. Tiurilate, oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj en la Nacia Sidejo.

***6.2 Plenumi efike la buĝeton de niaj kontoj.*** La jaro estis aparte malfacila por mastrumado de la buĝeto en CUP kaj USD; ambaŭ estis deficitaj. Tamen, oni sukcesis garantii la esencajn servojn kaj eventojn planitajn, kvankam bezonatas ankoraŭ plua servado al la esperantistaro tutlande.

***6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute.*** La Komisiono estis kompletigita dum la Komitatkunsido en Santa Clara kaj oni faris la koncernajn financajn reviziadojn nacinivele kun tre bonaj rezultoj.

***6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.*** Oni daŭre insistis pri tio, ke la filioj bone kontrolu siajn financojn, kaj tiucele, filio Camagüey sukcese faris demarŝojn por havigi al si komercan rajtigon, kio ja estas bona paŝo por memfinancado. Ni konscias, ke tiu ĉi tasko devas esti konstanta. Dum 2001, la filioj alkutimiĝis transpagi pere de BANDEC, kio administre multe helpas la laboron, ĉar tiamaniere la proceduro estas pli facila, kaj la filioj kaj ni havas dokumentojn kiuj atestas la pagojn. Preskaŭ ĉiuj filioj sendas la kotizkvitancaron bonorde; ni havis malfacilaĵojn tiuflanke nur kun la provinca filio Urbo Havano. Krome, oni kontrolis dufoje la financan fakon al tiu ĉi lasta Filio kaj la rezultoj ambaŭkaze, ne estis bonaj.

## 7. *INSTRUADO*

La tre sporadaj kaj tute supraĵaj ricevitaj informoj, jen persone, jen pertelefone, jen skribe, ne permesas al ni taksi objektive la laboron de la Asocio en tiu ĉi grava kampo, ĉar eĉ provincoj kiuj tradicie sin karakterizis pro oftaj kaj ĝisdetalaj raportoj, ĉi-jare ne sendis ilin, kaj tiuj raportoj kiuj atingis nin estis tiel formalaj kaj seninformaj, ke el ili oni povas veni al nenia konkludo. Kompreneble, tio tute ne signifas ke la filioj ne laboris ĉi-kampe, sed por ĉiuj komitatanoj devas esti tre evidente kaj klare ke, sen bazaj informoj, simple ne eblas fari naciskalan raporton. Okazas, ke la ciferoj kiuj povus helpi dece kaj ĝuste bildigi la nunan staton de la Asocio en la instrua fako, mankas. Pro tio, ni preferas ke, dum la Komitatkunsido, la reprezentantoj de filioj parole informu al la komitatanoj pri la laboro farita en la instrua agado kaj, kompreneble, ke ĉiu filio liveru ĝisdetalan skriban jarraporton (laŭ semestroj, niveloj, ktp.) kun la ĝisdatigita statistiko (januaro-decembro / 2001) pri la instrua agado en la koncerna teritorio. Surbaze de tiuj informoj, oni pli poste pretigos decan kaj realan naciskalan raporton, kiu pli bone kaj adekvate permesu al ni analizi niajn mankojn kaj atingojn ĉi-kampe. Alimaniere, ni simple trompos nin mem kaj la jarraporto ne estos objektiva.

## 8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

Ni konsideras ke la kultura laboro tra la lando dum 2001 estis sufiĉe bona, tamen plibonigenda. Pri tiu afero en filioj ni ne multe konis, ĉar informoj mankis. Nur en la kazo de Urbo Havano kaj Santiago de Cuba, kie ekzistis trimonataj planoj por aranĝoj, oni havas precizigojn, kaj ofte ni ricevis protokolojn. Tamen en kelkaj filioj la membroj preparis sin por partopreni en la Festivalo, kies rezultoj estis kontentigaj, sed nia laboro ne povas nur iri survoje de eventoj.

***8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.*** Regule niaj estraranoj kaj aktivuloj tra la lando, agadas por pli kaj pli levi la konscion de nia membraro pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado, profitante la diversajn aranĝojn por priparoli tiujn temojn, okazigi konkursojn kaj krei la etoson taŭgan en niaj renkontiĝoj kaj eventoj. Kompreneble, tio ne ĉiam okazas ĉie kaj multe pli ankoraŭ ni devas fari por ke la membraro en la filioj profitu ĉiujn eblajn momentojn kaj ekspluatu siajn kapablojn. Naciskale la tuta esperantistaro devas pli profiti la rezultojn de konstanta laboro de la Komisiono pri Historio.

***8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo omaĝe al la 22a datreveno de KEA.*** Okaze de la 22a datreveno de KEA, oni organizis kaj aranĝis kulturajn renkontiĝojn en kelkaj filioj. La Ĉefa Aranĝo okazis en la KEA-Sidejo de Centra Havano kun pli ol 70 partoprenantoj.

***8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.*** Tiu ĉi laborkampo estas plibonigenda. Oni devas strebi al varbado de profesiaj artistoj kiuj povas regule kunlabori kun la Asocio, ĉar tio garantios pli altnivelajn kulturajn prezentojn. Oni ja kontentige proksimiĝis al kulturdomoj kaj grupoj kiuj partoprenis en diversaj aranĝoj kaj renkontiĝoj, kio estis sufiĉe instiga por pripensi daŭran laboron tiudirekte. Oni devas pli atenti la artistojn kiuj daŭre pretas kunlabori.

***8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj: Partopreni la Internacian Librofoiron.*** Dum 2001 nia kultura fako iomete pli emfazis sian agadon pri reprezentiĝo de KEA en eksterasociaj kulturklerigaj eventoj, kiel necesa konstanta laboro, tiel ke ĝi kontribuas al plialtigo de la asocia prestiĝon kaj de E kiel lingvo, kio devas esti aktiva parto de niaj taskoj. Ankoraŭ ni povas multe pli aktivi en eksterasociaj medioj. Rilate al la Havana Librofoiro, ne eblis partopreni, ĉefe pro la fakto ke ni ne sukcesis enskribiĝi ĝustatempe. Ni jam alpaŝis pri la alvokoj al tiu grava evento kaj planas partopreni la venontan librofoiron.

***8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.*** Ne sufiĉas, ke en la Centra Oficejo de KEA ekzistas riĉa librokolekto, kiam la plejmulto de nia membraro preskaŭ ne interesiĝas pri tio. Dum la dua semestro de la jaro, nia Biblioteko restis plejparte fermita pro manko de organiza laboro kaj kondiĉoj por bona kontrolo. Tamen dum tiu tempo preskaŭ neniu pruntepeto venis. Ne nur ĉe la CO, sed en kelkaj urboj estas stokoj da E-libroj en la provinca aŭ loka biblioteko, tamen la esperantistoj ne uzas ilin. Kompreneble, la uzado de tiuj kolektoj dependas ankaŭ de nia kapablo

stimuli nian membraron pli legi. Oni petis subvencion por nia biblioteko, kiu estis akceptita de UEA.

***8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.*** Dum la restado de esperantistoj en kampadejoj kaj regionaj renkontiĝoj oni multe profitis la okazon montri kaj eksterigi nian kulturon. Tiel multaj ne-esperantistoj konas pri la agado de nia Asocio. Dum 2001 la laboro en tiu ĉi kampo estis sufiĉe vigla, ĉar multaj kamaradoj efike kontribuis: la plej bona ekzemplo de tio estis la aktiva partopreno en la Nacia Kultura Festivalo. Do, la kulturaj eventoj estis farataj laŭplane kaj tiusence ni devas ankoraŭ pli insisti en la kvalita preparo de la kulturaj eroj en ĉiuj regionaj renkontiĝoj, tiel ke ili fariĝu veraj kulturaj momentoj per kiuj la esperantistoj pli konatiĝu kun la E-kulturo.

***8.7. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la Festivalo en Camagüey.*** La Estraro daŭre kontrolis la demarŝojn kun la filio Camagüey, laŭplanite. Okazis pluraj vizitoj kaj kunsidoj en la menciita teritorio kun la diversaj instancoj administraj kaj kulturaj. Danke al tio oni povis ĝustatempe decidi ŝanĝon de la sidejo tuj kiam estiĝis nesolveblaj obstakloj pri transporto. La translokiĝo al Urbo Havano estis pozitiva tiel ke ni daŭre povis atenti la demarŝojn kaj okazis bona kunlabora fluo kun la filio, kiu lastmomente akceptis la defion. La rezulto estis pozitiva por la movado.

## 9. *INTERNACIAJ RILATOJ*

***9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Germana E-Asocio kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj aliaj E-institucioj.*** Ni daŭrigis regulajn rilatojn kun diversaj landaj, regionaj kaj lokaj asocioj. Elstaris la kunlaboro kun FEL, pere de Eddy Raats kaj kun la nederlanda sekcio de ILEI. Oni havis multajn kontaktojn kaj rilatojn kiuj plenumis tiun ĉi taskon. Ni ankaŭ sendis la asocian organon al ĉiuj kontinentoj, el kiuj iom post iom oni ricevis samtempe iliajn informilojn. Al tio aldonendas nia laboro eksterlanden per la retpoŝto. Krome, kelkaj esperantistoj partoprenis internaciajn eventojn kaj spertiĝis ĉe lokaj E-grupoj: aprile, Juan Ramón Rodríguez kaj Alberto García Fumero reprezentis KEA-n en la 5a Tutamerika Kongreso de Esperanto, okazinta en Meksikurbo; meze de la jaro, Maritza Gutiérrez, Héctor Jiménez, Juan Ramón Rodríguez kaj Marta Alonso reprezentis la Asocion en la 86a UK, en Zagrebo; la tri unuaj ankaŭ ĉeestis kaj prelegis en la 34a ILEI-Konferenco, same en Kroatio. Krome, Juan Ramón Rodríguez partoprenis la 74an Kongreson de SAT, en Hungario. Antaŭ kaj post tiuj eventoj, ili kvar kontaktis kun dekoj da esperantistoj kaj asocioj en Germanio, Belgio, Francio, Svislando, Anglio, ktp. Ankaŭ Mayra Núñez kaj María Julia Cárdenas restis kelkajn monatojn en Eŭropo, kie ili partoprenis diversajn E-renkontiĝojn. Fine de la jaro, Francel Briel vojaĝis al Argentino por instrui la Yumeiho- terapion en tiu lando, Urugvajo kaj Brazilo.

***9.2. Daŭre kontribui al evoluo de E en Latinameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.*** Ni daŭrigis niajn jam kutimajn kontaktojn kun landoj de tiu ĉi kontinento. Ni ne nur adresis leterojn kaj informilojn al ili, sed ankaŭ okazis personaj kontaktoj. Krom la reprezentiĝo de KEA en la 5a TAKE, Maritza kaj Juan Ramón Rodríguez partoprenis la kunsidon pri Ameriko

dum la UK. Tie nia Ĝenerala Sekretario prizorgis la Budon Ameriko. Dum la tuta jaro kelkaj ei ni havis regulajn retpoŝtajn kontaktojn kun s-ro Atilio Orellana, UEA-Komisiito pri Ameriko. Ofte aperis informoj pri nia movado en la regiona informilo kaj multaj personoj interesiĝis pri la poresperanta agado en Kubo, eĉ pri la ebleco vojaĝi al nia lando.

## 10. FAKA AGADO

***10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.*** Oni ĉiam atentas la homojn kiuj interesiĝas pri tiu ĉi laborsfero, tamen la rezultoj ne ĉiam estas sufiĉaj. Oni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al apliko de E en la respektivaj laborfakoj.

***10.2. Daŭre informi la membraron pri apliko de E en Scienco kaj Tekniko, enkaj eksterlande.*** Oni laboris por daŭre informi la esperantistojn pri scienco kaj tekniko. Oni intencis arigi diversajn fakgrupojn, sed ankoraŭ ni ne sukcesis tiurilate. Temas pri daŭra informa laboro, sed bezonatas pli da persisto kaj subteno de la koncerna komisiito kaj de la filiaj estraranoj.

***10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.*** Tiu ĉi sfero ankoraŭ estas tre baza kaj ne respegulas la potencialon ekzistantan en la tuta insulo. Nova maniero stimuli la agantojn por ST estas aperigi specialajn eldonojn de *Teknika bulteno* kun la plej sukcesaj prelegoj, kion ni decidis fari jam ekde la jaro 2000. Oni preparis ĉiujn elektitajn tekstojn kaj ni esperas ke tiu bulteno aperos komence de 2002. Oni okazigis Seminariojn pri Apliko de E en Scienco kaj Tekniko en Urbo Havano kaj Santiago de Cuba, kaj pri tiu fako oni multe parolis en diversaj aranĝoj.

***10.4. Flegi la agadon de KEMA.*** La medicinistoj estas en kontentiga kontrolo flanke de la komisiito, sed la obstaklo estas la nekontentiga lingvonivelo de tiuj specialistoj, kiuj tamen interesiĝas pri diskonigo kaj interŝanĝo inter si. En la lastaj monatoj oni kontaktis alifoje kun estraro de la hospitalo Miguel Enríquez (en Urbo Havano), kie antaŭ kelkaj jaroj oni instruis Esperanton kaj la hospitala gazeto *Archivos de la Medicina* diskonigis siajn resumojn ankaŭ en la IL. Ili interesiĝis pri la afero kaj pri la ebleco rekomenci la eldonadon de tiu gazeto, eĉ en Esperanto.

## 11. LIBROSERVO

***11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.*** Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo. Ni reproduktis sufiĉan kvanton da kasedoj (*Juliano kantas, Latinamerika mozaiko, Voĉoj el Kubo, Por puŝi la ĉaron*, kaj instrukasedoj) kaj translokis kelkajn librojn el Biblioteko al Libroservo.

***11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.*** La estraranino pri Financo kaj la komisiito pri Libroservo serioze entreprenis la aferon kaj pro tiu koncepto, ni sukcesis plenumi la CUP-buĝeton je 101 %. En USD, ni nur enspezis parton (ĉefe dum la UK kaj TAKE). Rilate al filioj, Matanzas (Pedro Betancourt) havas ŝuldon.

## 12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

***12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.*** Dum 2001,

la komisiito pri atento al alilandaj esperantistoj nebone laboris en sia fako: kelkfoje la prezidantino kaj la kasistino kunsidis kun li por analizi la problemojn, tamen la rezulto restis senefika. Kie ekzistis trimonataj planoj por aranĝoj, ne aperis la bulteno *KEA-TUR*; la grupo funkcianta en Urbo Havano sub lia gvido ne kunsidis (vizitis Kubon kvar polaj grupoj, sed mankis bona distribuo de la laboro). El eksterlando, rimarkindas la kontribuo de s-ro Eddy Raats, kiu multe helpas la Asocion ankaŭ ĉi-kampe.

***12.2. Prepari lokajn esperantistojn por atenti alilandajn esperantistojn***. Tiu ĉi grava laboro daŭris dum 2001, sed ne tiel efike kiel antaŭe. Ni devas rimarki, ke la laboro ne estis kontentiga rilate al disdono de taskoj, mastrumado kaj ĝenerala organizo, kio sendube rezultigis ke tiu ĉi fako ne kontentigis siajn membrojn kaj aktivulojn tra la lando.

## *13. ATENTO AL VERKISTOJ*

Tiu ĉi branĉo restis stagnita, rezultoj ne estis, sed ankaŭ mankis pli forta insisto kaj sindediĉo al tio. Sendube, oni devas trovi aliajn rimedojn por la sukcesigo en rilato kun la reago de verkistoj.

***13.1. Kolekti la mankantajn materialojn por finpretigo kaj eldono de la libro omaĝe al la 4a Kongreso de KEA***. Por tiu tasko la koncerna komisiito kolektis la tekstojn, reviziis ilin, kaj post la korektoj mankas decidi pri la eldono.

***13.2. Prispuri materialojn por novelaro eventuale eldonota.*** La situacio rilate al tiu ĉi punkto estis reale neefika. Ĝi restis nula, do, oni devas rekonsideri ĝian validecon aŭ ne por la venonta periodo.

***13.3. Daŭre instigi nian samideanaron interesiĝantan pri beletro al verkado.*** Oni povas konstati, ke ni devas multon fari por sukcesigi nian agadon ĉikampe. Ni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al verkado esperantlingve. Tamen, krom instigoj, bezonatas reagoj kaj tio, nek kutime nek hazarde aperas, pro diversaj kialoj. Dum la lastaj jaroj, oni ne sukcesas eĉ partoprenigi la esperantistaron en konkursoj. Indas serĉi novajn vojojn kaj stimulilojn.

## *14. TRA LA FILIOJ*

Kiel jam estas tradicio en niaj estraraj raportoj al la Komitato, ĉi tie oni metas resumon de la agado en tiuj filioj kiuj sendis jaran informon al la Estraro. Malgraŭ la fakto ke delonge ĉiuj provincaj kaj municipaj filioj, kaj municipaj grupoj, konas pri la bezonata jara raporto, en rilato kun la agado dum la jaro 2001 en la koncernaj teritorioj nur sendis informojn Santiago, Sancti Spiritus, Granma kaj Urbo Havano. Jen kelkaj komentoj pri ili:

**Santiago de Cuba:** La filio sendube avancis. En kelkaj fakoj, eĉ financa, ili faris seriozan laboron. Rilate al laborsferoj, ili estis tre aktivaj en la organiza agado (dum la jaro ili regule kunsidis kaj sendis la koncernajn protokolojn kaj aliajn raportojn ĝustatempe kaj kun la bezonataj detaloj), kulturo (oni regule okazigis kulturajn aranĝojn), instruado (diverstipaj E-kursoj: bazaj kaj superaj), publikaj rilatoj (pli fortaj ol dum la antaŭa jaro; la rilatoj kun politikaj, registaraj instancoj, kaj la rilatorgano, bone funkciis, helpis multe al funkciado de la filio kaj donis prestiĝon en la lasta periodo). Kiel rezulto de akurateco pri sendado de informoj, la precizaj kaj ĝisdetalaj raportoj, kaj la laborrezultoj, la filio gajnis la interfilian konkura-

don en ambaŭ semestroj kaj pro tio ricevis koncernajn stimulojn.

**Sancti Spíritus:** Tiu ĉi filio, krom Santiago, Granma kaj Urbo Havano, estas la plej stabila kaj akurata en la sendado de informoj al la Estraro. Tio jam delonge okazas kaj same okazis dum la periodo, kun ĉiuj detaloj laŭ fakoj, eĉ la Jara Raporto, kaj tio ja validas. Tamen estas bedaŭrindaĵo la tiea situacio rilate al la movado, ĉar ĝi vere stagnas kaj nur malgranda grupo ekzistas. Tutjare, la informoj montris tion kaj, je la fino, oni vidas la samon: 10 kotizantoj en la unua semestro kaj 6 en la dua. Malgraŭ daŭra propagando, reago pri kursoj ne estis (nur unu lernanto en la baza kurso), la radiorubriko malaperis. Do, la movadaj aferoj tie iom post iom malaperas kaj oni antaŭzorgas pri tio, ĉar temas pri filio kun jura personeco kaj longa vivo. Tamen, kelkajn atingojn ili havas: rilate al 2000, la financoj iomete kreskis pro enspezo de kotizo; ĉiuj eldonnumeroj de *Jajabo* aperis; la rilatoj kun MINJUS daŭre stabilis; kaj ili bonege organizis la Seminarion pri Informado. Meritas rekoni la seriozecon kaj ĝustecon de la Prezidantino kaj la Ĝenerala Sekretario, en rilato kun la informoj, ĉar neniam ili malaperigas la veron.

**Granma:** Post la malbona situacio travivita de la filio dum 1999 kaj parto de 2000, oni komencis vidi vivsignojn kaj plifortigon de la movado. La Provinca Estraro reorganizis la esperantistojn en kelkaj municipoj, ne nur en Bayamo, disvolvis fortan propagandan laboron per la radio (el kio venis reagoj por perkoresponda kurso), rekontaktis la registarajn instancojn, sukcesis kreskigi la membro-nombron (42 kaj 56 en la unua kaj dua semestroj, respektive), okazigis ĉiujn estrarkunsidojn kaj sendis siajn ĝisdetalajn protokolojn kaj informojn ĝustatempe, partoprenis en ĉiuj tutlandaj eventoj kaj faris kelkajn kulturajn aranĝojn (en la kulturdomo, la komunumoj, ktp). Imitindas, speciale, la agado sur la kampo de perkoresponda kurso. Do, nuntempe la agado avancas denove, kaj nun oni laboras por plikreskigi kaj firmigi la movadon.

**Urbo Havano:** La filio laboradis surbaze de laborplano en ĉiuj sferoj de la Asocio. Ili okazigis ĉiujn ordinarajn kunsidojn. Menciindas la laboro rilate kulturajn aranĝojn (20 sabatajn, kiujn partoprenis 661 esperantistoj kaj 129 invititoj; 4 kulturklerigajn), menciindas kreskigo kaj stabileco de la movado (167 membroj en la unua semestro kaj 204 en la dua) kaj la instrua laboro. Pri tiu ĉi lasta sfero, la filio okazigis 14 renkontiĝojn kun la lernantoj, 5 seminariojn pri gramatiko, 3 konversaciajn rondojn, 4 renkontiĝojn kun instruantoj, kaj malfermis superan kurson por aktivuloj (naciaj kaj provincaj). Rilate al informado, oni garantiis regulan diskonigon pri E kaj KEA-agado per naciaj kaj provincaj radiostacioj, televidkanaloj kaj uzis grafikan propagandon, ĉefe por varbi interesitojn por niaj kursoj. Krome, reprezentantoj de la filio aktive partoprenis diversajn aranĝojn tutlandaj, kiel la Kultura Festivalo kaj la Seminario por Instruistoj. Ilia ĉefa problemo fontis el nebona laboro de la kasisto, kio kreis tiklan situacion en la financa kaj administra laboro de la filio, kaj rezulte en la neorda kontrolo de la membraro. La filio organizis la projekton Zamenhof, kiu celas prepari estontajn gvidantojn por la asocio.

## *ČEFAJ TASKOJ DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO POR LA JARO 2002*

### 1. INFORMADO

1.1. Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.

1.2. Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E.

1.3. Eldoni ĉiujn nacinivelajn informilojn kiel parton de *Avanco* kaj aperigi ĝin 4-foje jare. Garantii la aperon de aliaj filiaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.

1.4. Ebligi regulan aperon en la internacia E-gazetaro.

1.5. Reaperigi la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn.

### 2. NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ

2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 23a datreveno de KEA.

2.2. Okazigi la 4an Nacian Kongreson en Urbo Havano (6a ĝis 9a de marto).

2.3. Okazigi la 11an Nacian Seminarion por instruistoj en Urbo Havano, dum majo.

2.4. Okazigi Nacian Infanrenkontiĝon en Holguín dum julio.

2.5. Okazigi la 2an Nacian Seminarion pri Informado en Santiago de Cuba dum septembro.

2.6. Okazigi Nacian Renkontiĝon en Guantánamo decembre.

### 3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ

3.1. Labori por revigligi la movadon en la teritorioj kun jura personeco: Insulo de la Junularo, Havano, Villa Clara kaj Holguín.

3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en Matanzas.

3.3. Labori por reaktivigi la agadon en Pinar del Río, Las Tunas, Ciego de Ávila kaj Cienfuegos.

### 4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

4.1. Membrokontrolo kaj kotizo.

4.2. Atento kaj vizitoj al filioj.

4.3. Kontrolo kaj atento al membrojsubtenantoj.

4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.

4.5. Plialtigi la nombron de IM de KEA en UEA.

### 5. PUBLIKAJ RILATOJ

5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiuj instancoj laŭeble.

5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj levi la influon en la komunumo.

5.3. Daŭrigi kunlaboron kun asocioj kulturklerigaj kiel Kuba UNESKO-Komisiono kaj Kuba UN-Asocio, kaj iniciati aŭ plifortigi ilin kun aliaj: Kuba Movado por la Paco, Fondaĵo Fernando Ortiz kaj Asocio de Lingvistoj.

### 6. FINANCO

6.1. Flegi la internan administradon de la sidejoj.

6.2. Plenumi efike la buĝetojn de la KEA-kontoj.

6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Financa Komisiono laŭstatute.
6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.
6.5. Kontrakti la servojn de CANEC.

## 7. INSTRUADO

7.1 Regulaj kursoj.
7.2. Kreskigi la Perkorespondan Kurson kaj daŭre atenti la enskribitojn diversmaniere.
7.3. Okazigi regionan seminarion por instruistoj por altigi ilian lingvan kaj kulturan scipovon.
7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro .
7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj.

## 8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ

8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.
8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo omaĝe al la 23a datreveno.
8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.
8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj komunumaj. Partopreni la Internacian Librofoiron de Havano.
8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas.
8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn.
8.7. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la Kongreso.
8.8. Zorgi pri fineldono kaj presado de la esearo.

## 9. INTERNACIAJ RILATOJ

9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Flandra E-Ligo, kaj aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj E-institucioj.
9.2. Daŭra kontribuo al evoluo de E en Ameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.
9.3. Funkciigi kunlaboran interŝanĝon kun unuopaj esperantistoj kaj institucioj tra la mondo.

## 10. FAKA AGADO

10.1. Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.
10.2. Daŭre informi la membraron pri apliko de E en Scienco kaj Tekniko en- kaj eksterlande.
10.3. Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de E en Scienco kaj Tekniko.
10.4. Flegi la agadon de KEMA.

## 11. LIBROSERVO

11.1. Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.
11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande.

## 12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ

12.1. Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.
12.2. Prepari lokajn movadanojn por ĉiceroni alilandajn esperantistojn.

## 19a Nacia Komitatkunsido


# Ni daŭrigas antaŭen

Denove la kuba ĉefurbo gastigis reprezentantojn el ĉiuj partoj de nia lando, ĉi-kaze celante okazigi la 19an Komitatkunsidon de KEA, kiu efike sesiis inter la 25a kaj 26a de januaro. Ĉiuj membroj de nia Komitato (20) ĉeestis la jaran renkontiĝon de la plej alta instanco de KEA.

Dum du labortagoj la komitatanoj plenumis tagordon kiu konsistis je 22 aspektoj.

Menciendas kaj menciindas la ĝisfunda analizo de la Estrara Raporto pri la agado dum la lasta jaro kaj la koncerna financa bilanco. Ankaŭ la serioza diskutado pri la konsisto de la ĉefaj laborkampoj dum 2002, la projektita buĝeto kaj la *Etika Kodo* por estraranoj.

Ero de la oficiala fermo estis la prezento de la Estraro por la oficperiodo 2002-2004 kaj la koncerna laborsfero de ties membroj. Tamen, kelkajn tagojn poste, la elektita prezidanto rezignis pro novaj taskoj en sia laborejo, kaj estis bezonata decido de la Komitato pri tiu posteno. Post ĝia voĉdono, la 5an de marto, la konsisto de la Estraro rezultis tiel: Maritza Gutiérrez González, *Prezidantino;* Juan Ramón Rodríguez Gómez, *Ĝenerala Sekretario;* Marta Eugenia Alonso Gutiérrez, *Financo;* Alberto Fernán-



*Laborsesio de la Komitato.*

dez-Calienes Barrios, *Informado kaj Eldona Agado;* Julián Hernández Angulo, *Kulturo kaj Disvastigo;* Pedro Fernández Rodríguez. *Instruado;* Alberto José García Fumero, *Utiligo*.

Entute, dum la Komitatkunsido, ni alprenis 21 interkonsentojn.

Tiuj tagoj plenplenaj je analizoj, diskutoj, opinioj, sugestoj kaj precizaj interkonsentoj montris la kapablecon de la Asocio tutlande, kaj ke ĝi havas sufiĉajn fortojn kaj energiojn por daŭrigi antaŭen.

JUAN RAMÓN RODRÍGUEZ GÓMEZ

***Tagordo de la 19a Komitatkunsido***

1. Nacia Himno.
2. Bonvena parolado.
3. Kontrolo de plenrajtaj membroj.
4. Kontrolo de kvorumo.
5. Elekto de la protokolantoj.
6. Aprobo de la Tagordo.
7. Kontrolo de interkonsentoj de la pasintjara kunsido.
8. Analizo kaj aprobo de la Estrara Raporto 2001.
9. Informoj el filioj.
10. Informo de la Komisiono pri Financo.
11. Aprobo de la bilancoj 2001 (CUP kaj USD).
12. Informo de la Kongresa Preparkomitato.
13. Informo de la Elekto-komisiono.
14. Elekto de la Skrutinia Komisiono.
15. Balotado.
16. Prezento de la nova Estraro.
17. Analizo kaj aprobo de la Ĉefaj Taskoj por 2002.
18. Analizo kaj aprobo de la buĝeto 2002 (CUP kaj USD).
19. Analizo pri disciplinaj aferoj.
20. Analizo kaj aprobo de Etika Kodo por estraranoj de la Asocio.
21. Informo pri rezultoj de la konkurado 2001.
22. Fermo.

***Interkonsentoj de la 19a Komitatkunsido***

1. Elekti s-rojn Pedro Fernández Rodríguez kaj Alberto García Fumero protokolistojn.
2. Aprobi la Tagordon.
3. Kunmeti ĉiujn naciajn bultenojn kiel parto de la oficiala organo de KEA.
4. Aprobi la Estraran Raporton kun ĉiuj amendoj.
5. Aprobi la CUP-Bilancon.
6. Aprobi la USD-Bilancon.
7. Aprobi la konsiston de la Elekto-komisiono.
8. Okazigi la 2an Nacian Seminarion pri Informado en Santiago de Cuba (septembro 2002).
9. Okazigi Tutlandan Renkontiĝon en Guantánamo (decembro 2002).
10. Okazigi Infanrenkontiĝon en Holguín (julio 2002).
11. Okazigi la 11an Seminarion por Instruistoj en Urbo Havano (majo 2002).
12. Kontrakti la servojn de CANEC (faka asocio por financa kontrolo) por revizii ĉiujare la financojn de la Asocio.
13. Elstarigi kulturajn intersanĝojn kun unuopuloj kaj Esperanto-institucioj tra la mondo.
14. Aprobi la Ĉefajn Taskojn de la Asocio por la jaro 2002.
15. Aprobi la CUP-Buĝeton 2002.
16. Aprobi la USD-Buĝeton 2002.
17. Aprobi *Etikan Kodon* por estraranoj je ĉiuj niveloj.
18. Okazigi la 20an Komitatkunsidon en Sancti Spiritus (januaro 2003).
19. Okazigi la 5an Seminarion pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (SAEST) en Urbo Havano (marto 2003).
20. Okazigi la 1an Tutamerikan Kulturan Festivalon en Santiago de Cuba en la jaro 2005.
21. Kompletigi la Komisionon pri Financo per Jorge L. González Santillán kaj Rafael R. Cabrera Espinosa.

# Alkongrese: ĉu nur lingve?

La kuba esperantistaro kongresas ĉiun trian jaron kun la sama entuziasmo de la unuaj tempoj inspirinta la fondintojn de KEA kaj ties posteulojn, pluraj el ili nunaj estraranoj kaj aktivuloj de la asocio.

Ĝuste tial ni dum tri jaroj laboris por garantii ke la kongresa jaro estu por nia asocio vigla kaj mobilizkapabla tiel ke ni devas aistrebi per niaj propraj homfortoj al sukceso de la plej grava kaj ja pinta evento de nia movado, kiu ĉijare okazis de la 6-a ĝis la 9-a de marto en la sidejo de la Muzeo pri Sciencoj "Carlos J. Finlay" en la malnova parto de Havano.

La kongreson partoprenis 122 esperantistoj el ok provincoj. Ses eksterlandaj esperantistoj venis el Belgio, Kroatio, Francio, Islando kaj Svedio.

La inaŭguran ceremonion partoprenis funkciuloj de la kuba Ministerio pri Kulturo kaj speciale invitita estis la prezidantino de la Kuba Asocio de Lingvistoj, kiu esprimis sian intereson pri E kiel lingva fenomeno kaj la emon de sia asocio starigi kunlaborajn rilatojn kun KEA.

La kongresa temo estis "Esperanto: ĉu nur lingvo?" Gvidita de Julián Hernández, estrano pri kulturo de KEA, kies enkonduka prelego pritraktis la demandon de la fenomeno Esperanto kiel lingvo, historio kaj nuntempo; alia prelego enkadrita en la kongresa temo estis prezentita de Alberto Fernández-



Calienes, estrarano pri informado, kiu pritraktis la fenomenon Esperanto ekde sociologia vidpunkto, historio kaj evoluo; kaj la ferma prelego pri la kongresa temo estis prezentita de Norberto Díaz, estrarano de la filio Sancti Spíritus centre de nia lando kaj redaktoro de la bulteno *Jajabo* en tiu provinco. Li prelegis pri Esperanto kaj kulturo. Kadre de tiuj prelegoj pri la kongresa temo okazis postaj debatoj kaj demando-respondoj kiuj certe pozitive kontribuis al kompreno kaj konscio pri tio ke Esperanto ne nur estas lingvo. Okazis krome aliaj prelegoj pri kulturaj kaj scienc-teknikaj temoj, interalie pri Nicolás Guillén, la nacia poeto; pri kuba kuirarto; pri parolkapabligo de lernantoj kaj aliaj pri medicino kaj juro.

Aliaj programeroj estis konkursoj pri gramatikaĵoj, pri historio de E kaj pri deklamado; aŭkcio kaj traurba promenado.






*Grupo de kongresanoj post la fermo de la kongreso.*
*S-ro Neven Kovačić el Kroatio/Belgio prelegas pri la Komunikadcentro en Bruselo.*
*Fotoj: Amado Guerra kaj Adolfo Alfonso.*

La vesperoj estis kulturaj eroj de la programo, speciale Kuba Vespero kie oni prezentis programon kiu inkluzivis dancojn tipajn, kantojn, deklamadon fare de artistoj el diversaj institucioj kulturaj de nia lando kaj ankaŭ kelkaj amatoraj artistoj de nia movado.

Speciale gravan rolon plenumis la informa fako kongresa per la valora kontribuo de Alejandro García. Antaŭ, dum kaj post la kongreso jurnalistoj raportis, intervjuis la kongresanojn kubajn kaj eksterlandajn kaj publikigis pozitivajn informojn pri la kongreso.

Grava helpo por nia asocio estis la subvencio veninta tra la Amerika Komisiono de UEA, kiu kontribuis al la sukceso de nia kongreso. Do, ni certe plifortiĝas kaj samtempe montras alternativojn ene kaj ekster la movado rilate la internacian lingvo-problemon.

Maritza Gutiérrez González



# 11a Internacia Librofoiro Havano 2002

## Sed dissaltis la obstinaj baroj

Kvankam oni povus pensi, ke mi celas Zamenhofaĵon, mia celo nun estas raporti pri la partopreno de Kuba Esperanto-Asocio en la Internacia Librofoiro Havano 2002. La aludo ja taŭgas, se diri la veron, por priskribi la tutan aferon... ĉar nur pro obstino ni atingis la celon.

Mi jam estas partopreninta plurajn internaciajn librofoirojn pro laboraj kialoj: la pasintan Librofoiron, ankaŭ okazinta en La Cabaña, mi ankaŭ partoprenis. Pro tio mi opinias min rajtigita taksi ĝin kiel la plej malbone organizita foiro de mi iam partoprenita... se mi devus priskribi la aferon pere de futbala ĵargono, mi tuj pensus pri "Malordo 1 – Librofoiro 0". Sed nu, vi mem juĝos...

### *Ĉu vi? Ĉu vi?*

Laŭ decido de la Nacia Estraro, la Ĝenerala Sekretario de KEA, Juan Ramón Rodríguez, kaj mi, estus la respondeculoj pri nia stando. Ni partoprenus per montrado de libroj el nia bone provizita biblioteko. Grandan helpon ni ricevis flanke de kelkaj aktivuloj, kiel Miguel Ángel González, Albertò Fernández-Calienes kaj Giezy Rodriguez, kiuj helpis dum la transportado de la libroj kaj kelkfoje deĵoris. Malgraŭ niaj planoj, ne eblis lasi en nia stando la videoaparaton por montrado de materialoj; simple ne aperis noktogardistoj. Ankaŭ neniu respondecis pri la enŝaltado de la elektro por la stando, do...

Jam la unuan tagon oni demetis de pluraj standoj en nia salono tri bretojn, kaj neniu kvanto da protesto sukcesis atingi la redonon. Ni ricevis nur promesojn, aŭ surprizajn mienojn. Fine ni ĉiuj rezignis pri la afero, kaj ne plu demandis. Pli sukcese estus diskuti kun la muroj de La Cabaña...

Bonŝance, la alfluo da publiko kaj la atento al ĝi forgesigis nin pri la problemoj. Kvankam kompreneble, kelkaj homoj ĝuste tiam eksciis pri Esperanto, la interesaj demandoj kaj la evidenta simpatio al nia afero estis vere refreŝiga en la varma salono. Kvankam ni alportis niaopinie sufiĉan kvanton da faldfolioj, ni estis devigitaj haste presigi pli da ili: ĉar post dimanĉo tuta skatolego elĉerpiĝis.

### *Asteriks internacia*

En la hispanaj standoj oni vendadis komiksojn de la serio pri Asteriks, kaj multaj geoatroj, lacigitaj de la longaj vicoj, serĉis aliloke. Multaj homoj, ĉefe infanoj, tuj rimarkis nian ekzempleron de *Asteriks ĉe la Olimpiaj Ludoj* kaj venis al ni demande de la prezo... Nur post pli deproksima observado venis la konstato, ke "ĝi ne estas en la hispana, sed en Esperanto", kaj la naiva

demando: "ĉu ankaŭ en Esperanto aperis Asteriks?" ĉiam donis al ni la ŝancon tut-simple respondi: "Jes, kial ne?" kaj komenti pri la vivanteco de Esperanto. La konstato, ke ni montris ne nur tiun komikson, sed ankaŭ plurajn infanlibrojn, konvinkis multajn je tio, kvankam kelkaj kompreneble esprimis dubojn pri la rolo de Esperanto en mondo tiel vaste "usonigita".

La plej simpatia estis trijara infanino, kiu responde al patrina klarigo, ke "la libro estas en Esperanto, ne en la hispana", asertis tute aplombe: "jes, mi scipovas legi tion"... bona ŝanco por varbado de sufiĉe juna aktivulino, mi diru...

*Larme pri la estinteco...*

Inter la vizitintoj troviĝis unu mistera, ŝajne avo ĉirkaŭita de genepoj, kiu alparolis nin en bonega Esperanto, iomete babiladis, kaj subite malaperis ĝuste kiam mi klopodis demandi lin pri lia nomo. Verŝajne li estis lerninta la lingvon antaŭ kelke da tempo, kaj kiel multaj, pro laboraj kaj/aŭ personaj kialoj, ne plu aktivis. Nia stando fariĝis renkontiĝejo por tiuj, kiuj ne nur nun, sed ĉiam, rilatas aŭ rilatis al Esperanto. Certas, ke se oni kalkulus je tiuj "eksaktivuloj", la membronombro de nia asocio duobliĝus. Unu el ili, nuna patrino de du infanoj, rememoris la "bonajn oldajn tempojn", kaj jes, larmeto aperis en ŝiaj okuloj...

*...sed ĝoje pri la estonteco*

Nia partopreno donis al ni la ŝancon fari bonan propagandon dum pli ol semajno, kaj konatigi al multaj homoj pri la internacia lingvo. Ankaŭ ni ricevis inviton flanke de la Nacia Libro-Ĉambro, partopreni la sekvajn aranĝojn de la Librofoiro, en Dominika Respubliko. Jam kontaktoj estas faritaj kun la esperantistoj en tiu lando por profiti la ŝancon kaj daŭrigi la laboron.

ALBERTO GARCÍA FUMERO



## La voĉo de Kubo en Ameriko

| HORO UTC | M | KHZ | REGIONO |
|---|---|---|---|
| 07.00 | 31 | 9820 | Okcidenta Norda Ameriko kaj Pacifika Azio |
| 15.00 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| 19.30 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 22.00 | 21 | 13715 | Eŭropo kaj Mediteraneo |
| 23.30 | 25 | 11760 | Tuta Ameriko kaj Karibio |
| 23.30 | 49 | 6070 | Tuta Ameriko kaj Karibio |

Oni povas aŭdi nin per Real Audio ĉiucimanĉe je la 15a horo UTC, tio estas, laŭ la internacia horarsistemo per la jena adreso:
**http://216.138.240.229/rc4**
Kaj per la servilo de Aŭstria Radio:
**http://roi.orf.at/esperanto_demand.html**
Ni petas al vi sendi raportojn pri aŭdebleco al la jenaj adresoj:
**radiohc@ip.etecsa.cu** aŭ **esperanto@rhc.cu**

**Radio Havano Kubo, Poŝtfako 6240, Havano, Kubo**

# 3a Seminario pri Informado

**Santiago de Cuba**
**20a-22a.09.2002**

3A
NACIA
INFANRENKONTIĜO

GUANTÁNAMO

19A-21A DE JULIO 2002

KANTOJ,
DANCOJ,
TEATRO,
DEKLAMADO,
KAJ...

ĈIO EN ESPERANTO!

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro